

LIBRARY OF THE UNIVERSITY OF TORONTO
100 ST. GEORGE STREET, TORONTO, CANADA



ĈE LA PIEDOJ
DE LA MAJSTRO
—
ALCYONE



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 10 - 3ª - 7, E-23015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4368079

2135



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3ª - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079


ĈE LA PIEDOJ

DE LA MAJSTRO



16x1970 hef 002135 m.p.





ALCYONE

Ĉe la piedoj de la Majstro

DE

ALCYONE

(J. Krishnamurti)



KUN PERMESO TRADUKITA DE

W. W. MANN



PARIS

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33




LONDON

THE THEOSOPHICAL PUBLISHING SOCIETY

161, NEW BOND STREET, W.

1913



PREZENTA PAROLO

La studanto de lingvoj scias, kiel grandvalore estas, parkere lerni pecojn el bone skribitaj verkoj en la lingvo akirata. Se li estas idealisto, li ne volas nur enmemorigi belajn vortojn kaj frazojn, sed deziras fari al si provizon ankaŭ de belaj idealoj — idealoj tiel koraltigaj kaj inspirantaj, ke ili formas multe ŝatatan posedon de la interna konscio.

Jen do libreto, tradukita en admirinda stilo, kiu enhavas gvidon je homa konduto tiel altega, ke ĝi

prenas rangon kun la etiko de la grandaj Sanktaj Skriboj de la mondo. Meti en sian spiriton la elektitajn trezorojn, kiujn ĝi proponas, estus ja beno por ĉiu lernanto de la kara lingvo.

Plue, la verkinto venis por helpi estigi en la mondo tiun Pacon, por kiu laboras ĉiuj Esperantistoj, kaj mi konas neniun aron de mondlaborantoj, kiu devus pli volonte akcepti lian Sendito-diron, ol niaj 'samideanoj', kie ajn ili estas.

A. P. WARRINGTON

*Generala Sekretario de la Teozofia
Societo en Ameriko.*

Noto. — La tradukinto deziras ĉi tie danki la alilandajn amikojn — kaj precipe S-ron Brodislav Kuhl — kiuj helpis al li pri la internacieco de la stilo.

ANTAŬPAROLO

Estas donita al mi la privilegio, kiel al pli aĝa, skribi vorton de enkonduko al ĉi tiu libro, la unua verkita de pli juna Frato, juna ja laŭ la korpo, sed ne laŭ la Animo.


La instruoj, kiujn ĝi enhavas, estis donitaj al li de lia Majstro, dum Tiu preparis lin al lia Iniciigo, kaj estas de-

skribitaj de li laŭ memoro — malrapide kaj pene, ĉar lia angla lingvo lastan jaron estis multe malpli flua, ol nun.

La pli granda parto estas reprodukto de la vortoj mem de la Majstro ; tiu parto, kiu ne estas laŭvorte reproduktita, prezentas la pensojn de la Majstro vestitajn en la pensojn de Lia lernanto. Du ellasitaj frazoj estas aldonitaj de la Majstro. En du aliaj okazoj ellasita vorto estas aldonita. Krom tio, ĝi estas tute la propra laboro de Alcyone, lia unua donaco al la mondo.

Ke ĝi tiom helpu aliajn, kiom la parolita instruado lin helpis — jen la espero, kun kiu li ĝin donas. Sed la instruado povas naski fruktojn nur tiaokaze, se oni ĝin *vivas*, tiel same, kiel li ĝin vivadas de la momento, kiam ĝi falis de la lipoj de lia Majstro. Se la ekzemplon li sekvados tiel, kiel la konsilon, tiam por la leganto, kiel tio okazis jam al la verkinto, malfermiĝos la granda Pordo, kaj liaj piedoj estos metitaj sur la Vojon.

ANNIE BESANT.



KLARIGAJ NOTOJ


Iniciigo signifas tiun plivastiĝon de la konscio, kiu okazas ĉe la disĉiplo per la sinintermeto de la *Guru* aŭ Instruisto, kiam Tiu definitive lin akceptas kiel lernanton — la « dua naskiĝo », kiu donante al la disĉiplo la « ŝlosilon de la scio », malŝlosas al li la pordojn de la naturo, kaj malfermas antaŭ li novajn perspektivojn de potenco kaj servado al la homaro. — Inicii, iniciito.

Astra korpo, mensa korpo. — La hinda filozofio instruas, ke la homa estaĵo konsistas ne el unu sola korpo, sed el aro da korpoj aŭ « ŝeloj » (*kosha*) aŭ « ingoj » unu aliajn interpenetrantaj, de diversaj gradoj de subtileco : ĉefe la *fizika korpo* (*sthula sharira*) kun la cerbo kaj la kvin sentorganoj ; la *astra korpo* (*sukshma sharira*), sidejo de la emocioj, pasioj, deziroj ; la *mensa korpo* (*manas*), sidejo de l' pensado kaj rezonado ; la *animo* (*buddhi*), sidejo de l' intuicio ; la *spirito* (*atma*), la plejalta memo, « radio » de la universala dia esenco.


Karmo (Sanskrite : *Karma*). — La universala leĝo de *kaŭzo kaj efiko*, laŭ kiu « oni tion rikoltas, kion oni semis » ; ankaŭ la *agado* konsiderata kiel kaŭzo aŭ efiko.

Renaskigado aŭ *reenkarniĝo*. — La transmigrado de la homa animo tra la tempo, laŭ la doktrino instruita de Pythagoras kaj komuna al multaj religioj, kiu diras, ke la homo havas ne unu solan vivon, sed multajn vivojn, reenkorpiĝadante fojon post fojo sur ĉi tiu tero, ĝis ĝi atingas la perfektecon.

La memo: La « mi », la « ego ». Estas du memoj en la homo ; la alta kaj la malalta, unu dia, kaj la alia duone besta.



ALTIUJ, KIUJ FRAPAS




असतो मा सद्गमय
तमसो मा ज्योतिर्गमय
मृत्योर्माऽमृतङ्गमय

De nerealò konduku min al la Realò

De mallumo konduku min al la Lumo

De morto konduku min al la Senmorteco



PROLOGO


Ĉi tiuj ne estas miaj vortoj ;
ili estas la vortoj de la Majstro,
kiu min instruis. Sen Li mi
povus fari nenion, sed per Lia
helpo mi metis miajn piedojn
sur la Vojon. Ankaŭ vi de-
ziras ekiri la saman Vojon,
tial la vortoj, kiujn Li diris
al mi, helpos ankaŭ vin, se

vi ilin obeos. Ne sufiĉas diri, ke ili estas veraj kaj belaj : kiu deziras sukcesi, tiu devas fari precize tion, kio estas dirita. Rigardi nutraĵon kaj diri, ke ĝi estas bona, ne satigos homon mortantan de malsato ; li devas etendi la manon kaj manĝi. Tiel ankaŭ, aŭdi la parolojn de la Majstro ne sufiĉas ; vi devas fari kion Li diras, atentante ĉiun vorton, sekvante ĉiun konsilon. Se konsilo ne estas kaptita, aŭ vorto ne rimarkita, ĝi estas perdita por ĉiam, ĉar Li ne parolas duan fojon.

Kvar estas taŭgokondiĉoj
por tiu ĉi Vojo :

Distingado ;
Sendezireco ;
Bona Konduto ;
Amo.

Kion la Majstro diris al mi
pri ĉiu el tiuj, tion mi provos
al vi ripeti.



Ĉe la piedoj de la Majstro

I

La unua el ĉi tiuj kondiĉoj estas la Distingado : ĉi tion oni ordinare komprenas kiel la distingadon inter la realo kaj la nerealo, kiu kondukas la homojn al la Vojo. Tio ĝi ja estas, sed ĝi estas ankaŭ multe pli, kaj ĝin oni devas praktikadi, ne nur ĉe la ko-

menco de la Vojo, sed ĉe ĉiu paŝo sur ĝi farata, ĉiutage ĝis la fino. Vi eniras la Vojon, ĉar vi lernis, ke sur ĝi sola povas esti trovataj tiuj aferoj, kiuj estas akirindaj. Kiu ne scias tion, laboras por akiri riĉecon kaj potencon, sed ĉi tiuj aferoj estas pleje por nur unu vivo, kaj tial nerealaj. Estas tamen aferoj pli grandaj, ol ili, aferoj realaj kaj daŭraj: se ilin vi unu fojon vidis, tiujn aliajn vi jam ne deziras plu.

En la tuta mondo estas nur du specoj de homoj — kiuj

scias kaj kiuj ne scias, kaj tiu scio estas tio, kio estas grava; kian religion homo akceptas, al kiu raso li apartenas — ĉio ĉi ne estas grava: la vere grava afero estas tiu scio — la scio pri la plano de Dio por la homoj. Ĉar Dio efektive havas planon, kaj tiu plano estas la evoluado. Homo, unu fojon tion ekvidinta kaj efektive ĝin scianta, ne povas ne laboradi por ĝi kaj sin kun ĝi ne unuiĝi, tiel glora ĝi estas, tiel bela. Do, ĉar li scias, li estas ĉe la flanko de Dio, starante por la bono kaj

kontraŭ la malbono, laborante por la evoluado kaj ne por la memamo.

Se li estas ĉe la flanko de Dio, li estas unu el ni, kaj tute ne grave estas, ĉu li sin nomas Hindo aŭ Buddhano, Kristano aŭ Muhammadano, ĉu li estas Indiano aŭ Anglo, Ĥino aŭ Ruso. Kiuj estas ĉe Lia flanko, tiuj scias, kial ili estas ĉi tie kaj kion ili devas fari, kaj ili provas ĝin fari; ĉiuj aliaj ankoraŭ ne scias, kion ili devas fari, kaj tial ili ofte agas malsaĝe kaj provas eltrovi vojojn, kiuj laŭ ilia

opinio estos agrablaj por ili mem, ne komprenante, ke ĉiuj homoj estas unu, kaj ke tial nur tio, kion volas la Unu, povas esti vere agrabla por kiu ajn. Ili sekvas la nerealon anstataŭ la realon. Kiel longe ili ne ellernis distingi inter tiuj du aĵoj, ili ne stariĝis ĉe la flanko de Dio. Tiu distingado estas do la unua paŝo.

Sed eĉ kiam tiu elekto estas jam farita, vi devas ankoraŭ memori, ke de la realo kaj la nerealo estas multaj specoj; ankoraŭ vi devas distingadi inter la bono kaj la malbono,

la grava kaj la malgrava, la utila kaj la senutila, la vero kaj la malvero, la egoismo kaj la altruismo.

La elekto inter la bona kaj la malbona ne devus esti malfacila, ĉar kiu deziras sekvi la Majstron, tiu jam decidis preni la bonan je kiu ajn kosto. Sed la korpo kaj la homo estas du malsamaj aferoj, kaj la homo ne ĉiam tion volas, kion deziras la korpo. Kiam via korpo ion deziras, haltu kaj pensu, ĉu vere ĝin *vi* deziras. Ĉar *vi* estas Dio, kaj vi nur tion volas, kion Dio volas ; sed vi

devas penetri profunden en vin mem por trovi Dion en vi, kaj por aŭskulti Lian voĉon, kiu estas *via* voĉo. Ne prenu erare viajn korpojn por vi mem — nek la fizikan korpon, nek la astran, nek la mensan. Ĉiu el ili ŝajngos sin la Memo, por akiri tion, kion ĝi deziras. Sed vi devas koni ilin ĉiujn, kaj koni vin mem kiel ilian mastron.

Kiam ia laboro devas esti farata, la fizika korpo deziras ripozi, promeni, manĝi kaj trinki ; kaj la homo nescianta diras al si : « Mi deziras fari ĉion ĉi kaj nepre devas tion fari ». Sed tiu homo, kiu scias,

diras : « Ĉi tio, kio deziras, *ne* estas mi, kaj ĝi devas iom atendi ». Ofte, kiam sin prezentas okazo por helpi iun, la korpo sentas : « Kiom tio min lacigos ; iu alia ĝin faru ! » Sed la homo respondas al sia korpo : « Vi ne malhelpos min, fari bonan laboron ».

La korpo estas via besto — la ĉevalo, sur kiu vi rajdas. Tial vi devas agi bone kontraŭ ĝi, kaj bone pri ĝi zorgi ; vi devas ne tro laborigi ĝin, devas nutri ĝin bone nur per pura bona manĝaĵo kaj trinkaĵo, kaj tenadi ĝin ĉiam perfekte pura, sen eĉ la plej

malgranda makuleto. Ĉar sen perfekte pura kaj sana korpo vi ne povas fari la malfacilan laboron de prepariĝado, ne povas elteni ĝian penigan kaj senĉesan provadon. Sed devas esti ĉiam vi, kiu regas tiun korpon, ne ĝi, kiu vin regas.

La astra korpo havas *siajn* dezirojn — dekojn da ili ; ĝi deziras, ke vi koleriĝu, diru akrajn vortojn, sentu vin ĵaluza, monavida, envidu al aliaj ilian havon, fordonu vin al malgajeco. Ĉion ĉi tion ĝi deziras kaj multe pli, ne pro tio, ke ĝi deziras vin mal-

utili, sed ĉar ĝi amas fortajn vibrojn, kaj amas, ilin senĉese ŝanĝi. Sed vi el ĉio ĉi bezonas nenion, kaj tial vi devas distingi inter viaj deziroj, kaj tiuj de via korpo.

Via mensa korpo deziras opinii sin fiere aparta, multe ŝati sin mem kaj malmulte la aliajn. Eĉ kiam vi ĝin jam deturnis de la aferoj de tiu ĉi mondo, ĝi ankoraŭ provas kalkuli je sia propra profito, provas igi vin pensi pri via propra progreso, anstataŭ pri la laboro de la Majstro kaj la helpado al aliaj. Kiam vi me-

ditas, ĝi provas igi vin pensi pri multaj aferoj, kiujn *ĝi* deziras, anstataŭ pri tiu, kiun *vi* deziras. Vi ne estas tiu menso, sed ĝi estas via, via por uzi; distingi do ankaŭ ĉi tie estas necese. Vi devas senĉese gardi vin, alie vi malsukcesos.

Inter la bono kaj la malbono la okultismo konas nenian kompromison. Je kiu ajn ŝajna kosto, la bonon vi devas fari, la malbonon vi devas ne fari, kion ajn la neŝiantoj pensas aŭ diras. Vi devas esplori profunde la kaŝitajn leĝojn de la Naturo, kaj

kiam vi ilin konos, tiam laŭ ili aranĝi vian vivon, agante ĉiam racie kaj prudente.

Vi devas distingi inter la grava kaj la malgrava. Firma kiel roko, kie la bono kaj la malbono estas koncernataj, cedu ĉiam al aliaj en tiuj aferoj, kiuj ne estas gravaj. Ĉar vi devas esti ĉiam milda kaj bonkora, modera kaj komplezema, lasante al la aliaj tiun saman liberecon, kiun vi bezonas por vi mem.

Provu vidi, kio estas farinda : kaj memoru, ke vi devas ne juĝi laŭ la amplekso

de la afero. Malgrandaĵo rekte utila en la laboro de la Majstro estas multe pli farinda, ol grandaĵo, kiun la mondo nomus bona. Vi devas distingi ne nur la utilan de la neutila, sed la pli utilan de la malpli utila. Nutri la malriĉajn estas laboro bona kaj nobla kaj utila; nutri iliajn animojn estas tamen pli nobla kaj pli utila, ol nutri iliajn korpojn. Ĉiu riĉulo povas nutri la korpon, sed nutri la animon nur la sciantoj povas. Se vi scias, estas via devo, helpi al aliaj scii.

Kiel ajn saĝa vi jam estas, sur ĉi tiu Vojo vi havas ankoraŭ multe por lerni ; tiel multe, ke ankaŭ ĉi tie vi devas distingi kaj zorge pripensi, kio estas lerninda. Ĉia scio estas utila, kaj iam vi scios ĉion ; sed tiel longe kiel vi havas nur parton, zorgu, ke ĝi estu la plej utila parto. Dio estas tiel same Saĝo, kiel Amo, kaj ju pli vi havas da saĝo, des pli da Dio vi povas elmontri. Studu do, sed studu unue tion, kio al vi plej helpos helpi aliajn. Laboru pacience ĉe viaj studoj, ne por tio, ke vi havu

la feliĉon esti saĝa, sed ĉar nur la saĝulo povas saĝe helpi. Kiom ajn vi deziras helpi, se vi estas malsaĝa, vi eble faros pli da malbono, ol da bono.

Vi devas distingi inter la vero kaj la malvero ; vi devas lerni esti trae vera, en la penso kaj parolo kaj ago.

Unue en la penso : kaj tio ne estas facila, ĉar estas en la mondo multe da malveraj pensoj, multaj malsaĝaj superstiĉoj, kaj neniuj, kiu estas ilia sklavo, povas progresi. Tial vi ne devas teni ian penson nur pro tio, ke aliaj ĝin havis,

nek pro tio, ke oni ĝin havis en la daŭro de centjaroj, nek pro tio, ke ĝi estas skribita en ia libro, kiun la homoj opinias sankta ; vi devas mem pripensi la aferon kaj mem juĝi, ĉu ĝi estas akceptinda. Memoru, ke kvankam milo da homoj konsentas pri iu afero, se ili nenion scias pri ĝi, ilia opinio tamen estas senvalora. Kiu volus iri la Vojon, tiu devas pensi por si mem, ĉar la superstiĉo estas unu el la plej grandaj malbonoj en la mondo, unu el la katenoj, de kiuj vi devas vin tute liberigi.

Viaj pensoj pri aliaj homoj devas esti veraj ; vi devas ne pensi pri ili tion, kion vi ne scias. Ne supozu, ke ili ĉiam pensas pri vi. Se iu homo faras ion, kio laŭ via opinio faros al vi malbonon, aŭ diras ion, kion vi pensas direktita kontraŭ vi, ne pensu tuj : « Li intencis fari al mi malbonon ». Plej verŝajne estas, ke li tute ne pensis pri vi, ĉar ĉiu animo havas siajn proprajn zorgojn, kaj ĝiaj pensoj turniĝas ĉefe ĉirkaŭ ĝi mem. Se iu homo parolas al vi kolere, ne pensu : « Li min malamas, li deziras

min vundi ». Verŝajne kolerigis lin iu aŭ io alia, kaj pro tio, ke li okaze renkontas vin, tial kontraŭ vi li turnas sian koleron. Li agas malsaĝe, ĉar ĉia kolero estas malsaĝa, sed vi ne devas pro tio pensi malvere pri li.

Kiam vi fariĝas lernanto de la Majstro, vi povas ĉiam kontroli la verecon de via penso, metante ĝin apud la Lian. Ĉar la lernanto estas unu kun sia Majstro, kaj bezonas nur remeti sian penson en la penson de la Majstro por vidi tuj, ĉu ĝi akordiĝas. Se ĝi ne akord-

iĝas, ĝi estas malĝusta, kaj li tuj ĝin ŝanĝas, ĉar la penso de la Majstro estas perfekta pro tio, ke Li scias ĉion. Kiuj ankoraŭ ne estas akceptitaj de Li, ne povas tute fari ĉi tion; sed ili povas multe sin helpi, haltante por konsideri: « Kion la Majstro pensus pri ĉi tio? Kion en tiuj cirkonstancoj farus la Majstro? » Ĉar vi neniam devas fari ion, kion vi ne povus imagi farata aŭ dirata de la Majstro.

Ankaŭ en la parolo vi devas esti vera — preciza kaj sen troigo. Neniam aljuĝu motivojn

al alia ; nur la Majstro konas liajn pensojn, kaj eble li agas pro motivoj, kiuj neniam sin prezentis al via menso. Se vi aŭdas ian rakonton kontraŭ iu, ne ripetu ĝin ; eble ĝi ne estas vera, kaj eĉ se ĝi estas vera, estas pli bonkore, diri nenion. Pripensadu do antaŭ ol paroli, por ne fali en malĝustecon.

Estu vera en la agado, neniam ŝajnigu vin alia, ol vi estas, ĉar ĉia ŝajnigo estas malhelpo kontraŭ la pura lumo de la vero, kiu devas brili tra vi tiel same, kiel la lumo

de la suno brilas tra klara vitro.

Vi devas distingi inter la egoismo kaj la altruismo. Ĉar la egoismo havas multajn formojn, kaj kiam vi pensas, ke vi fine ĝin mortigis sub unu formo, ĝi tiam sin montras kun tute egala forto sub alia. Sed iom post iom vin tiel plenigos la pensoj pri helpado al aliaj, ke ne restos plu iu loko, iu tempo, por ia penso pri vi mem.

Ankaŭ en alia maniero vi devas lerni distingi. Lernu distingi la Dion en ĉiu kaj ĉio,

tute egale, kiel ajn malbona li aŭ ĝi ŝajnas supraĵe. Vi povas helpi vian fraton per tio, kion vi havas komuna kun li, kaj tio estas la Dia Vivo ; lernu veki tion en li, lernu voki al tio en li : tiel vi savos vian fraton de la malbono.

II

Estas multaj, por kiuj la Kondiĉo de Sendezireco estas malfacila, ĉar ili sentas, ke ili *estas* siaj deziroj — ke se la ilin distingantaj deziroj, amoj kaj malamoj estos forprenataj de ili, restos neniom da ili mem. Sed ili estas nur tiuj, kiuj ne vidis la Majstron ; en la lumo de Lia sankta ĉeesto,

ĉia deziro mortas, krom la deziro, esti simila al Li. Tamen antaŭ ol vi havos la feliĉon, renkonti Lin vizagon kontraŭ vizaĝo, vi povas jam atingi la sendezirecon, se vi volas. La Distingado jam montris al vi, ke la aferoj, kiujn la plej multaj homoj deziras, tiaj, kiel riĉeco kaj potenco, ne estas havindaj ; kiam ĉi tio estas ne nur dirata sed efektive sentata, ĉia deziro je ili ĉesas.

Ĝis tie ĉio estas simpla ; necesas nur, ke vi komprenu. Sed estas kelkaj, kiuj forlasas la persekutadon de teraj celoj

nur por gajni la ĉielon, aŭ por atingi personan liberigon el la renaskigado ; en tiun eraron vi devas ne fali. Se vi tute forgesis la memon, vi ne povas pripensadi, kiam tiu memo devos esti liberigita, aŭ kian ĉielon ĝi ricevos. Memoru, ke ĉiu memama deziro ligas, kiel ajn alta estas ĝia celo, kaj ĝis vi vin liberigis de ĝi, vi ne estas tute libera, dediĉi vin al la laboro de la Majstro.

Kiam ĉiuj deziroj por la memo jam malaperis, povas ankoraŭ resti deziro, vidi la

rezultaton de via laboro. Se vi helpas al iu, vi deziras *vidi*, kiom vi lin helpis; eble vi eĉ deziras, ke ankaŭ li ĝin vidu kaj estu danka. Sed ĉi tio estas ankoraŭ deziro, kaj ankaŭ manko de fido. Kiam vi elverŝas tutan vian forton por helpi, la rezultato devas nepre sekvi, tute egale, ĉu vi ĝin vidas aŭ ne; se vi konas la Leĝon, vi scias, ke tiel devas esti. Vi do devas fari la bonon pro amo al la bono, ne pro espero pri rekompenco; vi devas fordoni vin al la servado al la mondo pro tio, ke

vi ĝin amas, kaj ne povas vin ne fordoni al ĝi.

Ne deziru psiĥajn povojn ; ili venos tiam, kiam la Majstro scios, ke pli bone estas, ke vi ilin havu. Eldevigi ilin tro frue ofte sekvigas multe da malbono ; ofte ilia posedanto estas erarigata de trompemaj naturspiritoj, aŭ fariĝas mem-estima kaj kredas, ke li ne povas erari ; kaj ĉiuokaze la tempo kaj forto, kiujn postulas ilia akirado, povus esti uzataj ĉe laboro por aliaj. Ili venos iom post iom laŭ via disvolviĝado — ili nepre *devas*

veni ; kaj se la Majstro vidos, ke estus por vi pli utile, havi ilin pli frue, Li diros al vi, kiel vi povos sendangere disvolvi ilin. Ĝis tiu tempo estos por vi pli bone, esti sen ili.

Ankaŭ vi devas gardi vin kontraŭ iaj malgrandaj deziroj, oftaj en la ĉiutaga vivo. Neniam deziru brili, aŭ ŝajni lerta ; ne deziru paroli. Bone estas, paroli malmulte ; ankoraŭ pli bone, diri nenion, krom se vi estas tute certa, ke tio, kion vi deziras diri, estas vera, bonkora kaj helpa.

Antaŭ ol paroli, pripensu zorge, ĉu tio, kion vi estas dironta, havas tiujn tri ecojn ; se ĝi ne havas, ne diru ĝin.

Bone estas, jam nun kutimi ĝi je zorga pripensado antaŭ ol paroli : ĉar kiam vi atingos Iniciitecon, vi devos atenti ĉiun vorton, por ke vi ne diru tion, kion oni devas ne diri. Multo el la ordinara parolado estas nenecesa kaj malsaĝa ; kiam ĝi estas klaĉo, tiam ĝi estas malbona. Kutimu do pli aŭskulti, ol paroli ; proponu opiniojn nur en la okazo, se oni rekte vin pri ili petas. Laŭ

unu prezento la taŭgokondiĉoj estas jene : scii, kuraĝi, voli, kaj silenti ; kaj la lasta estas el ĉiuj kvar la plej malfacila.

Alia ofta deziro, kiun vi devas severe subpremi, estas la deziro, vin miksi en la aferojn de aliaj homoj. Kion alia faras aŭ diras aŭ kredas, ne estas afero via, kaj vi devas lerni, lasi lin absolute trankvila. Li havas plenan rajton al libera penso kaj parolo kaj agado, tiel longe, kiel li ne miksas sin en la aferojn de aliaj. Vi mem pretendas al libereco fari tion, kion vi opinias

ĝusta; al li vi devas lasi la saman liberecon, kaj kiam li uzas tiun liberecon, vi ne havas ian rajton paroli pri li.

Se vi pensas, ke li faras malbone, kaj vi povas aranĝi oportunan okazon por diri al li private kaj ĝentile, kial vi tiel pensas, estas eble, ke vi lin konvinkos, sed estas multaj okazoj, ĉe kiuj eĉ tio estus nedeca sinintermeto. Nenial vi devas iri klaĉi al iu tria persono pri la afero, ĉar tio estus ago ekstreme malbona.

Se vi okaze vidas ian kruelajn faratan kontraŭ infano aŭ

besto, estas via devo vin interrometi. Se vi vidas iun agantan kontraŭ la leĝo de la lando, vi devus informi la aŭtoritatojn. Se al vi estas konfidata la zorgado pri alia persono, por lin instrui, eble montriĝos via devo, milde al li rimarkigi liajn mankojn. Krom ĉe tiaj okazoj, okupu vin pri viaj propraj aferoj, kaj lernu la virton de l' silento.

III

La ses specialaj necesajoj pri la konduto estas donitaj de la Majstro jene :

1. Memregado pri la Menso.
2. Memregado en la Agado.
3. Toleremo.
4. Gajeco.
5. Unuceleco.
6. Fido.

[Mi scias, ke kelkaj el ĉi tiuj estas ofte tradukataj alie, kiel ankaŭ la nomoj de la taŭgo-kondiĉoj ; sed por ĉiu mi uzas tiun nomon, kiun donis al mi la Majstro mem, ilin al mi klarigante.]

1. *Memregado pri la Menso.*

— La Kondiĉo de Sendezireco montras, ke oni devas regi la astran korpon : ĉi tiu montras la samon pri la mensa korpo. Ĝi signifas regadon de la humoro, tiel ke vi sentu nenian koleron, nek malpaciencon ; regadon ankaŭ de la menso

mem, tiel ke la pensado estu ĉiam trankvila kaj serena ; kaj la regadon (per la menso) de la nervoj, tiel ke ili estu kiel eble malmulte iriteblaj. Ĉi tiu lasta estas malfacila, ĉar kiām vi provas prepari vin por la Vojo, vi nepre igas vian korpon pli sentema, tiel ke ĝiaj nervoj estas facile malkvietigataj de sono aŭ ŝoko, kaj sentas tre akre ian premon ; vi tamen devas fari kiel eble plej bone.

La kvieta menso signifas ankaŭ kuraĝon, tiel ke vi povu sen timo fari fronton

kontraŭ la provoj kaj malfacilaĵoj de la Vojo ; ĝi signifas ankaŭ firmecon, tiel ke vi rigardu kiel bagatelojn la ĉagrenojn, kiuj venas en ĉies vivon, kaj evitu tiun senĉesan sinturmentadon pri malgraŭaĵoj, per kiu multaj homoj pasigas la plejmulton da sia tempo. La Majstro instruas, ke tute ne estas grave, kio okazas al homo de ekstere : malĝojoj, ĉagrenoj, malsanoj, perdoj — ĉiuj ĉi por li devas esti kvazaŭ nenio, al ili li devas malpermesi, efiki kontraŭ la kvieteco de lia menso. Ili

estas la rezultato de pasintaj agoj, kaj kiam ili venas, vi devas ilin elporti gajhumore, memorante, ke ĉio malbona estas nedaŭra, kaj ke via devo estas, resti ĉiam ĝoja kaj serena. Ili apartenas al viaj antaŭaj vivoj, ne al ĉi tiu ; vi ne povas ŝanĝi ilin, senutile do estas, pri ili sin turmenti. Pensu prefere pri tio, kion vi faras nun, kio faros la okazojn de via plej proksima vivo, ĉar ŝanĝi tiun vi *povas*.

Neniam al vi permesu, senti vin malĝoje aŭ malgaje. Malgajeco estas malbona, ĉar ĝi

infektas aliajn homojn kaj igas ilian vivon pli malfacila, kaj tion vi ne rajtas fari. Tial, se iam ĝi sin prezentas ĉe vi, forĵetu ĝin tuj.

Ankaŭ en alia maniero vi devas regi vian pensadon, vi devas ne permesi, ke ĝi vagu. Kion ajn vi faras, fiksi vian pensadon sur ĝi, por ke ĝi estu dece farata ; ne lasu vian menson senokupa, sed tenadu ĉiam bonajn pensojn sur ĝia fono, pretajn elveni tuj, kiam ĝi estas libera.

Uzu vian penskapablon ĉiutage por bonaj celoj ; forto vi

estu en direkto al la evolucio. Ĉiun tagon pensu pri iu homo, kiun vi konas malĝoja, aŭ suferanta, aŭ bezonanta helpon, kaj elverŝu sur lin pensojn de amo.

Retenu vian menson de la fiereco, ĉar la fiereco venas nur de malsaĝeco. Homo, kiu ne scias, pensas ke li estas granda, ke li faris tiun aŭ alian grandan faron; la saĝulo scias, ke nur Dio estas granda, ke ĉiu bona laboro estas farata sole de Dio.

2. *Memregado en la Agado.*
— Se via pensado estas tia,

kia ĝi devus esti, vi ne havos multe da embaraso pri via agado. Tamen memoru, ke por utili al la homaro, la pensado devas naski agadon. Devas esti nenia mallaboremo, sed konstanta aktiveco en bona laboro. Sed *propran* vian devon vi devas fari — ne tiun de alia, krom kun lia permeso kaj por lin helpi. Lasu ĉiun fari sian laboron laŭ sia propra maniero ; estu ĉiam preta, proponi helpon tie, kie ĝi estas bezonata, sed *neniam* intermetu vin. Por multaj homoj estas la plej malfacila

afero en la mondo, lerni sin okupi nur pri siaj propraj aferoj ; sed estas precize tio, kion vi devas fari.

Provante vin dediĉi al pli alta laboro, vi ne devas pro tio forgesi viajn ordinarajn devojn, ĉar ĝis tiuj estas plenumitaj, vi ne estas libera por alia servado. Neniajn novajn mondajn devojn vi devas entrepreni ; sed kiujn vi jam prenis sur vin, tiujn vi devas plenumi perfekte — t. e., ĉiujn klarajn kaj laŭprudentajn devojn, kiujn vi mem akceptas, ne imagitaj devoj, kiujn aliaj

provas trudi al vi. Se vi volas esti Lia, la ordinaran laboron vi devas fari pli bone, ol aliaj, ne pli malbone ; ĉar ankaŭ tion vi devas fari pro amo al Li.

3. *Toleremo.* — Al ĉiuj vi devas senti perfektan toleremon, kaj koran intereson tiom al la kredoj de alireligianoj, kiom de samreligianoj. Ĉar ilia religio estas tiel same vojo al la plejalta, kiel la via. Kaj por helpi al ĉiuj, vi devas ĉiujn kompreni.

Sed por akiri tiun perfektan toleremon, vi unue devas mem

esti libera de ĉia bigoteco kaj superstiĉo. Vi devas lerni, ke necesas neniaj ceremonioj ; alie vi kredos vin iel pli bona, ol tiuj, kiuj ceremoniojn ne plenumas. Tamen vi ne devas kondamni tiujn aliajn, kiuj ankoraŭ tenadas je ceremonioj. Ili tiel faru, kiel ili volas ; nur ili devas ne sin intermiksi pri vi, kiu scias la veron — ili devas ne provi trudi al vi tion, kion vi preterkreskis. Ĉion konsideru indulgeme ; estu bonkorema pri ĉio.

Nun, kiam viaj okuloj estas malfermitaj, kelkaj el viaj

iamaj kredoj, el viaj malnovaj ceremonioj, eble ŝajnas al vi absurdaj; eble ili efektive ja estas tiaj. Tamen, kvankam vi ne povas plu partopreni en ili, respektu ilin pro tiuj bonaj animoj, por kiuj ili estas ankorau gravaj. Ili havas sian lokon, sian utilon; ili similas al tiuj duoblaj linioj, kiuj, kiam vi estis infano, gvidis vin skribi rekte kaj ebene, ĝis fine vi lernis skribi multe pli bone kaj multe pli libere sen ili. Iam vi bezonis ilin; sed tiu tempo nun pasis.

Granda Instruisto iam skri-

bis : « Kiam mi estis infano, mi parolis kiel infano, mi komprenis kiel infano, mi pensis kiel infano ; sed kiam mi fariĝis viro, tiam mi formetis infanaĵojn ». Tiu tamen, kiu forgesis sian infanecon kaj perdis simpation al la infanoj, ne estas tiu, kiu kapablas ilin instrui aŭ helpi. Tial ĉiun rigardu bonkore, milde, tolerance ; sed ĉiun, ĉu li estas Buddhano, ĉu Hindo, ĉu Ĝajno, ĉu Judo, ĉu Kristano, ĉu Muhammadano.

4. *Gajeco*. — Vi devas elporti vian karmon gaje, kia

ajn ĝi estas, opiniante honoro tion, ke vin trafas la sufero, ĉar tio montras, ke la Estroj de l' Karmo juĝas vin helpinda. Kiel ajn malfacila ĝi estas, estu danka, ke ĝi ne estas ankoraŭ pli malfacila. Memoru, ke vi ne multe utilas al la Majstro, ĝis via malbona karmo estas elkvitigita kaj vi estas libera. Per tio, ke vi oferis vin al Li, vi petis, ke via karmo estu akcelata, kaj tiel vi nun tralaboras en unu aŭ du vivoj tion, kio alie povus etendiĝadi tra centoj da vivoj. Sed por plej bone ĝin

profiti, vi devas elportadi ĝin gaje, kun ĝojo.

Ankoraŭ alia punkto. Vi devas forlasi ĉian senton de posedo. La karmo eble rabos al vi tion, kio plej plaĉas al vi — eĉ tiujn homojn, kiujn vi plej amas. Eĉ tiam vi devas esti gaja — preta fordoni ĉiun kaj ĉion. Ofte la Majstro bezonas elverŝi Sian forton sur aliajn per Sia servisto ; tion Li ne povas fari, se la servisto cedas al malgajeco. Vi do devas estadi gaja.

5. *Unuceleco*. — La unusola afero, kiun vi devas meti an-

taŭ vi kiel farotan, estas la laboro de la Majstro. Kiu ajn alia laboro sin prezentas al vi, almenaŭ tiun vi devas neniam forgesi. Tamen, nenio alia *povas* sin prezenti, ĉar ĉiu helpema, memoferema laboro estas ja laboro de la Majstro, kaj ĝin vi devas fari pro amo al Li. Kaj al ĉiu peco da laboro, ĝin farante, vi devas doni vian atenton tutan, por ke la laboro estu via plej bona. Tiu sama Instruisto ankaŭ skribis : « Kion ajn vi faros, faru ĝin *elkore*, kvazaŭ por Dio, kaj ne por la ho-

moj ». Prezentu al vi, kiel vi farus ian laboron, se vi scius, ke tuj venos ĝin rigardi la Majstro ; ĝuste tiel vi devas fari tutan vian laboron. Kiuj plej multon scias, tiuj plej bone scios, kion signifas tiu verso. Estas ankaŭ alia simila, multe pli antikva : « Kion ajn via mano trovas por fari, faru per tuta forto ».

Unuceleco signifas ankaŭ, ke nenio iam vin deturnos, eĉ momente, de tiu Vojo, kiun vi ekiris. Nenia tento, nenia monda plezuro, eĉ nenia monda amo devas iam vin

deflankigi. Ĉar vi mem devas fariĝi unu kun tiu Vojo ; ĝi devas tiel fariĝi parto de via naturo, ke vi sekvu ĝin sen ia bezono pensi pri ĝi, kaj jam ne povu vin deturni. Vi, la Monado, tion decidis : ĝin forlasi estus forlasi vin mem.

6. *Fido.* — Al via Majstro vi devas fidi ; vi devas fidi al vi mem. Se vi vidis la Majstron, vi al li fidos ĝis la plej lasta grado, tra multaj vivoj kaj mortoj. Se vi ankoraŭ ne vidis Lin, vi malgraŭ tio devas peni realigi Lin kaj al Li fidi, ĉar se vi tion ne

faras, eĉ Li ne povas vin helpi. Se ne estas perfekta fido, ne povas esti perfekta fluado de amo kaj potenco.

Vi devas fidi al vi mem. Vi diras, ke vi tro bone vin konas? Se tiel vi sentas, vi *ne* konas vin, vi konas nur la malfortan eksteran ŝelon, kiu ofte falis en la koton. Sed *vi* — la vera vi — estas ero de la fajro de Dio mem, kaj Dio, la Ĉiopotenca, estas en vi, kaj pro tio estas nenio, kion, se vi volas, vi ne povus fari. Diru al vi: « Kion la homo faris, homo povas fari. Mi

estas homo, tamen ankaŭ Dio en la homo; tion mi povas fari, kaj ja faros ». Ĉar via volo devas esti kvazaŭ el trempita ŝtalo, se vi dezirus iri la Vojon.

IV

El ĉiuj Kondiĉoj postulataj, la plej grava estas la Amo, ĉar se ĝi estas sufiĉe forta en homo, ĝi devigas lin akiri ĉiujn ceterajn kondiĉojn, kaj ĉar ĉiuj ceteraj, sen ĝi, neniam mem sufiĉus. Ofte oni tradukas ĝin kiel « intensa deziro al liberiĝo el la rondoj de naskiĝoj kaj mortoj, dezirego al unuiĝo kun

Dio ». Sed tia prezento de ĝi ŝajnas egoista, kaj donas nur parton de la signifo. Ne estas tiom deziro, kiom *volego*, firmdecidemo, nepre-faremo. Por efiki sian rezultaton, tiu firma decido devas tiel plenigadi vian tutan naturon, ke ne restu loko por sento alia ajn. Ĝi estas ja la volo esti unu kun Dio, ne por tio, ke vi povu vin liberigi el la laceco kaj la suferado, sed por ke el via profunda amo al Li vi povu agi kun Li kaj kiel Li. Pro tio, ke Li estas Amo, vi ankaŭ, se vi dezirus unuiĝi kun Li,

devas esti plena je perfekta memoferemo kaj amo.

En la ĉiutaga vivo tio havas du signifojn : unue, ke vi zorgu, malutili al neniu vivantaĵo ; due, ke vi ĉiam atentu oportunan okazon por helpi.

Unue, ne malutilu. Tri pekoj estas, kiuj efikas pli da malutilo, ol ĉio alia en la mondo : klaĉo, krueleco kaj superstiĉo — ĉar ili estas pekoj kontraŭ la amo. Kiu deziras korplenigi je amo al Dio, tiu kontraŭ tiuj tri devas senĉese gardatenti.

Vidu, kion faras la klaĉo. Ĝi komenciĝas per malbona

penso, kio mem estas krimo. Ĉar en ĉiu kaj ĉio estas bono ; en ĉiu kaj ĉio estas malbono. Unu aŭ alian ni povas fortigi pensante pri ĝi, kaj tiumaniere ni povas helpi aŭ malhelpi al la evolucio ; ni povas fari laŭ la volo de la Logos aŭ ni povas Lin kontraŭstari. Se vi pensas pri la malbono en alia homo, vi faras samtempe tri malbonaĵojn :

1) Vi plenigas vian ĉirkaŭaĵon je malbona penso anstataŭ je bona penso, kaj tiel vi plimultigas la malĝojon en la mondo.

2) Se estas en tiu homo la malbono, kiun vi pensas, vi ĝin fortigas kaj nutras, kaj tiel plimalbonigas vian fraton, anstataŭ lin plibonigi. Sed plej ofte la malbono ne estas tie, vi nur pensis ĝin; kaj tiam via malbona penso tentas vian fraton fari malbonon, ĉar se li ankoraŭ ne estas perfekta, vi povas lin fari tia, kia vi lin pensis.

3) Vi plenigas vian propran menson je malbonaj pensoj anstataŭ bonaj, kaj tiel vi malhelpas vian propran kreskadon kaj faras vin, por la vidipovaj,

malbela kaj dolora objekto, anstataŭ bela kaj aminda.

Ankoraŭ ne kontentigita de tio, ke li efikis tiom da malutilo al si kaj al sia viktimo, la klaĉemulo penas per ĉiuj fortoj igi aliajn homojn partopreni en lia krimo. Avide li diras al ili sian malbonan rakonton, esperante, ke ili ĝin kredos; kaj tiam ili kuniĝas kun li elverŝante malbonajn pensojn kontraŭ la kompatinda suferanto. Kaj tio okazadas tagon post tago, farate ne de unu homo, sed de miloj da homoj. Ĉu vi jam ekvidis

kiel malnobla, kiel terura peko ĉi tio estas? Vi devas ĝin tute eviti. Neniam diru malbonon pri kiu ajn; rifuzu aŭskulti, kiam iu homo diras malbonon pri alia, sed diru milde: « Eble ne estas vere, kaj eĉ se vere estas, estas pli bonkore, ne paroli pri tio ».

Nun pri la krueleco. Ĝi estas duspeca: intenca kaj senintenca. Intenca krueleco estas, celkonscie kaŭzi doloron al alia vivantaĵo; kaj tio estas la plej granda el ĉiuj pekoj — laboro pli de diablo, ol de homo. Vi eble diras, ke tion

neniu farus ; sed la homoj jam ofte tion faris, kaj ĝin ankoraŭ nun ĉiutage faras. La inkvizitoroj ĝin faradis ; multaj religiuloj ĝin faradis en la nomo de sia religio. Vivisekciistoj tion faras ; ĝin faras multaj instruistoj tute kutime. Ĉiu el ili provas senkulpigisian brutalecon dirante, ke tio estas kutimo ; sed krimo ne ĉesas esti krimo per tio, ke multaj ĝin faras. La Karmo ne atentis, ke estas kutimo, kaj la karmo de krueleco estas la plej terura el ĉiuj. Almenaŭ en Hindujo tiaj kutimoj ne

estas senkulpigeblaj, ĉar tie la devo de senmalutileco estas konata al ĉiuj. La sorto de la kruelulo devas nepre trafi ankaŭ tiujn, kiuj eliras kun intenco mortigi la kreitaĵojn de Dio kaj nomas tion « sporto ».

Tiajn aferojn vi ne faris, mi scias ; kaj pro amo al Dio, kiam okazo sin prezentos, vi parolos klare kontraŭ ili. Sed estas krueleco ankaŭ en parolo, tiel, kiel en agado ; kaj homo, kiu diras vorton kun intenco vundi alian, estas kulpa pri krueleco. Ankaŭ

tion vi ne farus ; sed ofte senzorga vorto tiom malutilas, kiom vorto malica. Vi do devas vin gardi kontraŭ tio, ke vi ne senintence estu kruela.

Tio okazas ordinare pro senpripensemo. Homo estas tiel plenigita je avideco kaj avar-eco, ke li neniam eĉ ekpensas pri la sufero, kiun li kaŭzas al aliaj pagante tro malmulte, aŭ malsatigante sian edzinon kaj infanojn. Alia homo pensas nur pri sia propra fideziro, kaj malmulte zorgas pri tio, kiom da animoj kaj korpoj li ruinigas kontentigante ĝin.

Nur por evitigi al si kelkajn minutojn da ĝeno, iu homo ne pagas siajn laboristojn en la akurata tago, nenion pensante pri la malfacilaĵoj, kiujn li faras al ili. Tiel, multe da suferado estas kaŭzata ĝuste per senzorgeco — per forgeso pensi, kiel iu ago efikos al aliaj homoj. Sed la Karmo neniam forgesas, kaj neniel atentigas la fakton, ke la homoj forgesas. Se vi deziras ekiri la Vojon, vi devas pripensi la sekvojn de tio, kion vi faras, por ke vi ne estu kulpa je senpripensa krueleco.

La superstiĉo estas alia potenco malbono, kaj kaŭzis multe da terura krueleco. Kiu estas ĝia sklavo, tiu homo malestimas aliajn, kiuj estas pli saĝaj, provas devigi ilin, fari kiel li mem. Pensu pri la terura buĉado kaŭzita de la superstiĉo, ke oni devas oferi la bestojn al Dio, kaj de la ankoraŭ pli kruela superstiĉo, ke la homo bezonas bestoviandon por sin nutri. Pensu pri la premegado, kiun la superstiĉo havigadis al homoj en nia amata Hindujo, kaj vidu en tio, kiel tiu mal-

bona eco povas naski senkoran kruelecon eĉ ĉe tiuj, kiuj konas la devon de l' frateco. Multajn krimojn faris la homoj en nomo de la Dio de l' Amo, puŝite de tiu koŝmaro de l' superstiĉo ; estu do tre zorga, ke de ĝi eĉ la plej malgranda postsigno ne restu ĉe vi.

Tiujn tri grandajn krimojn vi devas eviti, ĉar ili fatale nebligas ĉian progresadon pro tio, ke ili pekas kontraŭ la amo. Sed vi devas ne nur vin deteni de la malbono ; vi devas aktive fari la bonon. Vi devas

esti tiel plenega je la intensa deziro al servado, ke vi estu ĉiam observema por fari servojn al ĉiuj ĉirkaŭ vi — ne nur al la homoj, sed eĉ al la bestoj kaj la vegetaĵoj. Vi devas fari servojn en malgrandaj aferoj ĉiutage, por ke vi ne preterlasu la maloftan okazon tiam, kiam sin prezentos la granda afero farota. Ĉar se vi sopiras al unuiĝo kun Dio, tio ne estas por vi mem ; ĝi estas por tio, ke vi estu kanalo, tra kiu Lia amo povos fluadi por atingi viajn kunhomojn.

Kiu estas sur la Vojo, ek-

zistas ne por si mem, sed por aliaj ; li forgesas sin mem, por servi al ili. Li estas kvazaŭ plumo en la mano de Dio, tra kiu Lia penso povas flui, kaj trovi por si ĉi sube esprimon, kiun sen plumo ĝi havi ne povus. Samtempe tamen li estas ankaŭ vivanta plumo de fajro elradianta sur la mondon tiun Dian Amon, kiu plenigas lian koron.

La saĝo, kiu faras vin helpipova, la volo, kiu direktas la saĝon, la amo, kiu inspiras la volon — jen viaj taŭgokondiĉoj. Saĝo, Volo kaj Amo

estas la tri aspektoj de la Logos ; kaj vi, kiu deziras vin dediĉi al servado al Li, devas elmontri tiujn aspektojn en la mondo.



